— ¿Española (hispana) o ibérica? ¿Cómo se llama nuestra nacionalidad y cómo se la conoce en el mundo entero? En ninguna parte se la conoce por *Iberia*, sino por *España*; luego el adjetivo derivado de este último nombre es el que cuadra mejor a nuestra unidad y el que, además, se ajusta a la más extensa internacionalidad por su generalidad.

oficialigon kaj faciligi ĝin uzi ĉiel ĉe kompleta politika, socia kaj religia, neŭtraleco.»

Ĉu estas eble fari amendon al ĉi tiu regulo?

Artikolo II^a. — «Membroj. Oni konsideras ĉiujn personojn akceptintajn kaj plenumintajn ĉi tiujn Statutojn membroj de H.E.A. La Direktanta Komitato aplikos ĉiuokaze la jenajn klasojn: a) efektivan; b) protektantan; c) honoran. Al la du lastaj klasoj povas aparteni ankaŭ Societoj, Organizaĵoj. La kotizo estos DU pesetoj po jaro; la Komitato rajtas ŝanĝi ĝin, kaj liberigi la honorajn membrojn el la pago, klarigante en la Kunvenoj, kiuj fine decidas, la decidojn.»

La antaŭa regulo perfekte difinas, ke nia organizaĵo estas el personoj, ĉar, kvankam Organizaĵoj povas esti membroj, tiuj akiras individuan karakteron. La personoj aliĝintaj, do, restas liberaj por sin arigi loke kaj regione laŭ propra plaĉo, kaj la Asocio, dum la ĵusa Kongreso de Sevilla, voĉdonis rekomendi kaj instigi al fondo de Grupoj kaj ke ĉi tiuj aliĝu al ĝi laŭ esprimas la regulo; kaj ĝi ne nur voĉdonis, ĝi apogadas efike al tiu starigo de Grupoj kaj de Federacioj el Grupoj kaj el izolitaj esperantistoj en iuj regionoj, kie la movado estas pli vigla, elpruvante tiel solidarecon kaj kunlaboradon al la celo por kiu oni starigis la Asocion, trafante restarigon de malnovaj Grupoj, fondon de novaj kaj de la Astura Federacio, farante la necesan laboron por fondi la Federacion de Galicia. Koncerne la jarkotizon, kion oni povas diri?

Artikolo III^a. — «Direktanta Komitato. Ĝi konsistas el Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario kaj Trezoristo krom du Voĉdonantoj po ĉiu regiono, kiujn oni elektis el la membroj de la Asocio. La templimo por la postenoj estas du jaroj, sed oni povas reelekti la komitatanojn, kiuj povas anstataŭi unu la alian ĉiuokaze.»

Tia konsisto kun DU VOĈDONANTOJ regionaj pruvas kiamaniere oni volas eviti tutan ideon pri absorvanta centremo, kaj bone atentu, ke la centra parto, tiel ni povas ĝin alnomi, elpruvadis la malon pri tiu centremo, reinstigante ĉiel kaj ĉiam la asturojn je la momento mem, kiam ekburĝonis la movado kaj ĉi tiu disvastiĝis, antaŭ ol fondi la Federacion, por ke ĉi tiuj estu nomintaj siajn DU VOĈDONANTOJN, kaj tute same agadis al la samideanoj de Galicia. Estas dece konstati, ke la Kon-

Artículo I.—«Objeto. H. E. A. tiene por objeto propagar y aplicar la lengua auxiliar internacional Esperanto en España, acelerar su adopción oficial y facilitar su uso por todos los medios, apartándose de cuestiones sociales, políticas y religiosas.»

¿Es posible reparo alguno a este artículo?

Art. II.—«Miembros. Se consideran miembros de H. E. A. cuantas personas acepten y cumplan estos Estatutos. Las categorías de socios, aplicables en cada caso por la Directiva, serán: a) numerarios; b) protectores; c) honorarios. A las dos últimas pueden pertenecer también Sociedades o Corporaciones. La cotización será de dos pesetas por año; el Comité está autorizado para variarla, así como para eximir de ella a los socios honorarios, dando cuenta de su justificación en las Asambleas, que serán las que en definitiva decidan.»

El artículo que precede perfectamente define que la unión es de individuos, aun cuando Sociedades o Corporaciones a ella pertenezcan, pues en este caso adquieren carácter de individualidad. Los individuos, pues, quedan libres para, local y regionalmente, agruparse como les plazca, y la Asociación, en su Congreso reciente de Sevilla, votó por que se constituyan Grupos y que éstos se adhieran con el carácter que el artículo dice, y no solamente votó, sino que viene ayudando eficazmente en la constitución de Grupos y de Federaciones de Grupos e individuos aislados en algunas regiones, en aquéllas en que el movimiento es más activo, dando prueba de solidaridad y de colaboración conforme a los fines para que fué creada, consiguiendo el restablecimiento de antiguos Grupos, la fundación de nuevos y de la Federación Asturiana, y poniendo los medios para fundar la Federación Gallega. En cuanto a la cuota anual, ¿qué puede decirse?

Art. III.—«Directiva. El Comité director de H. E. A., elegido entre sus miembros, estará compuesto de presidente, vicepresidente, secretario y tesorero, más dos vocales por cada región. Los cargos durarán dos años y son reelegibles, siendo reemplazables entre sí las obligaciones y atribuciones de cada cargo.»

La constitución de la Directiva con dos vocales regionales demuestra cómo se quiere evitar toda idea de centralismo absorbente, y téngase bien en cuenta que la parte central, que

greso de Bilbao decidis, ke la Prezidanto kaj Komitatanoj en konstanta rilato kun li loĝu en Madrido, por profiti apudecon al la Registaroj, kaj tiel funkciadi en plej bonaj cirkonstancoj por trafi ilian intereson al nia celo; do, la *centremo* ne estas novaĵo, ĉu tiamaniere volas ĝin kvalifiki malprave iuj, ĉar ĉion oni submetis je la decido de la regionaj Voĉdonantoj kaj la plej granda kaj plenrajta kunveno ĝenerala, la Kongreso de Sevilla, ĉion sankciis kaj eĉ unuanime voĉdonis dankesprimon al la direktantoj pro la efektivigita laboro kaj la granda sukceso atingita dum la du forkurintaj jaroj de la Kongreso de Madrido (dum kiu oni aprobis ĉi tiujn statutojn, kiujn prezentis nia entuziasma samideano de Cordoba, S-ro Francisco Azorin) al tiu de Sevilla, intertempo sufiĉa por elpruvi la efikon de la regularo kaj de la Asocio.

Artikolo IV^a.—«Statutoj. Nur, laŭ voĉdono de du trionoj el la efektivaj membroj, oni povos fari ŝanĝon en la Statutoj; saman nombron postulas voĉdono por malaperigi la Asocion.»

La antaŭa artikolo ne bezonas komentarion.

Artikolo V^a.—Kongresoj. Laŭ eblo, oni okazigos Kongreson aŭ ĝeneralan Kunvenon ĉiujare. Ĝiajn decidojn oni konigos al ĉiuj membroj per la gazeto aŭ per cirkulero kaj ili estos validaj de post tri monatoj, dum kiuj la duono de la efektivaj membroj nur povos ilin rifuzi. Dum ĉi tiuj Kongresoj la Direktanta Komitato klarigos detale sian agadon, kaj du kompetentaj efektivaj membroj nomitaj de la Kunveno revizios la kalkulojn.»

Ĉio, kion la Kongreso de Sevilla voĉdonis, aperis sur ĉi tiu gazeto, kaj tial, ĉio estas en ordo, ĉar nenio ĝis nun estas rifuzita kaj, kiel antaŭe estas dirite, la Direktanta Komitato plenumis tutplene la regulon, pro kio unuanime oni dankesprimis ĝin.

Artikolo VI^a.—«Gazeto. H. E. A. publikigos siajn komunikadojn kaj konigos sian agadon per hispana esperanta presitaĵo, se eble propra organo, kaj en ĉi tiu okazo la Direktoro apartenos al la Direktanta Komitato de H. E. A.»

Artikolo VII^a.—«Instituto. Oni fondas en Hispanujo, kiel teknikan organizaĵon de H. E. A., la Instituton de Esperanto, sed ĝi estos aŭtonoma kun propra regularo.»

Artikolo VIII^a.—«Sidejo kaj kapitalo. La oficiala loĝejo de H.E.A. estas tiu de la Hispana Ruĝa Kruco, hodiaŭ Sagasta, 10,

pudiéramos llamar, ha demostrado todo lo contrario a ese centralismo instando reiteradamente a los astures, tan pronto como el despertar esperantista adquirió desarrollo y antes de organizar la Federación, para que nombraran sus dos vocales, procediendo de igual modo con los esperantistas gallegos. Conviene hacer constar que en el Congreso de Bilbao se decidió que en Madrid debían residir el presidente y la parte de la Directiva en inmediata relación con él, para que estuviesen inmediatos a los Gobiernos, y de tal suerte estar en mejores condiciones de trabajo para interesarlos por nuestra causa; luego el *centralismo* actual no es una cosa nueva, si es que así lo quieren calificar algunos, sin razón, puesto que todo ha sido sometido a la decisión de los vocales regionales, y la máxima Asamblea general de miembros, el Congreso de Sevilla, todo lo sancionó y hasta unánimemente dió un voto de gracias a los dirigentes por la labor realizada y el gran éxito alcanzado en los dos años transcurridos del Congreso de Madrid (en que se aprobaron estos Estatutos, presentados por nuestro entusiasta samideano de Córdoba D. Francisco Azorín, al de Sevilla, tiempo suficiente para demostrar la eficacia del Reglamento y de la Asociación.

Art. IV.—«Estatutos. Sólo mediante el voto de dos tercios de los socios numerarios podrá acordarse un cambio en los Estatutos; igual número es preciso para decidir la disolución de la Sociedad.»

No necesita comentario el precedente artículo.

Art. V.—«Congresos. Se efectuará, en lo posible, un Congreso o Asamblea general anual. Sus acuerdos se notificarán a todos los socios por el periódico o por circular, y serán válidos si en los tres meses siguientes no fueran desechados por más de la mitad de los numerarios. En estos Congresos la Directiva dará cuenta de su actuación, y sus cuentas serán informadas por dos socios competentes nombrados por la Asamblea.»

Todo cuanto el Congreso de Sevilla acordó vió la luz en esta revista, y, por tanto, todo está en orden, ya que nada fué rechazado hasta ahora, y, como se dice anteriormente, la Directiva cumplió el artículo en toda su extensión y recibió por unanimidad un voto de gracias.

Art. VI.—«Gaceta. H. E. A. publicará sus comunicaciones y dará cuenta de su gestión en una publicación esperantista es-

Madrid, okaze de disiĝo la kapitalon ricevos la esperantista Grupo plej multenombra de Hispanujo.»

Ankaŭ ni ne bezonas komentarioj la antaŭajn artikolojn; sed estas utile diri, por fini, ke ĉiu hispana esperantisto aliginta al H. E. A. studu la statutojn kaj komentariojn, faru siajn rezonadojn, demandu sin mem ĉu estas necese aŭ ne enkonduki ŝanĝojn en ilin, ĉu la agado de la Direktanta Komitato, ĉu la rezultato de la agado kaj la progreso de H.E.A., konsilas reformojn, ŝanĝojn, sintenadojn aŭ ion ajn. Faru tion senpartie, trankvile kaj formu vian definitivajn opinion por efikigi ĝin ĉu necese laŭ rajtigas la IV^a regulo.

DANCO DE PRAVIA

(ASTURIAS)

Festvestite jen fianĉo:
pinto supren, ĉapo lia;
tibikarno, tute muda,
kun baston'; li, tre gracia.

*Tion ĉi kantu
ĉe la vilaĝo
dum la Pravia
danca kuraĝo.*

Pli, ol luno kaj la steloj,
bela min junuloj vidas,
oni diras; tamen, saĝe,
pri la diroj mi ne fidas.

*Tion ĉi kantu
ĉe la vilaĝo
dum la Pravia
danca kuraĝo.*

Tradukis J. M. R.

pañola, si es posible órgano propio, perteneciendo en este caso el director al Comité director de H. E. A.»

Art. VII.—«Instituto. Se crea en España, como órgano técnico de H. E. A., el Instituto de Esperanto, con vida autonómica y Reglamento propio».

Art. VIII.—«Domicilio y Fondos. El domicilio social de H. E. A. es el de la Cruz Roja Española, hoy Sagasta, 10, Madrid. En caso de disolución los fondos sociales irían al Grupo esperantista local más numeroso en España.»

Tampoco es necesario comentario alguno a los artículos precedentes; pero sí conviene decir, para terminar, que todo esperantista español afiliado a H. E. A. estudie los Estatutos y comentarios, haga sus razonamientos, se pregunte a sí mismo si precisa o no introducir modificaciones en ellos, si la gestión de la Directiva y el resultado de la gestión y la marcha de H. E. A. inducen a aconsejar reformas, cambios, actitudes o cosa alguna. Hacedlo imparcialmente, serenamente, y formad vuestra opinión definitiva para hacerla valer en uso del artículo IV en caso de necesidad.

DANZA DE PRAVIA

(ASTURIAS)

Fachendosu va mi maju
con montera picu arriba,
la pantorra al viento fresco
y un garrote en compañía.

*Y esto que canten
n'a mi quintana,
ye la guapina
danza de Pravia.*

Dicenme que soy más mona
que la luna y las estrellas,
y aunque pobre rapaciña
yo me río de simpleses.

*Y esto que canten
n'a mi quintana,
ye la guapina
danza de Pravia.*

PRI ĈI TIU GAZETO

Respondante la gratulojn pro la plinombrigo da paĝoj, pro la hispan-esperanta teksto kaj pro la enhavo, atentu ke la miraklon ni ŝuldas al nia samideano S-ro Julian Garcia Aguirre, kiu prenis sur sin la elspezon pro la eldonado; kaj de ni mem dependas la vivo kaj estonta ampleksiĝo ĝia, ĉar estas devo nia varbi kiel eble plej multenombrajn protektantojn por la gazeto. Mi rimarkigas, ke, kvankam mi faras la tutan redaktlaboron kaj pagas kovertojn kaj poŝtelspezojn, ankaŭ mi pagis mian protektantan kotizon. Montru vian kontenton per varbado de protektantoj, por ke S-ro Aguirre konsciu, ke lia penado kaj memofero estas fruktodona kaj promesas kompenson; konvinku amikojn kaj disĉiplojn pri neceso protekti la gazeton, kiu estas nia ligilo, kaj kiu faras al nia Hispana Esperanto-Asocio grandan servon kaj al ĉiu el ni. Korajn dankojn al nunaj protektantoj kaj ankaŭ peton: ne laciĝu ĉe viaj rondoj protektantigi kiel eble plej da personoj.

J. M., R.

SOCIEDAD ESPAÑOLA ESPERANTISTA

El Comité Central de Hispana Esperanto Asocio ha convenido, entre otros asuntos, en sus reuniones ordinarias: Aprobar las Actas del Congreso de Sevilla; que las Actas de los Congresos celebrados bajo los auspicios de H. E. A. lleven el visto bueno del Presidente, cuando éste no sea el Presidente efectivo del Congreso; que D. Antonio Jiménez Mora sea el promotor y organizador del VIII Congreso Español de Esperanto en Oviedo; aceptar a D. Salvador Oliván como Vocal representante de los samideanos de Galicia; nombrar la Comisión para estudiar las proposiciones presentadas ante el Congreso de Sevilla; invitar a los samideanos para que confirmen sus Vocales, o los elijan donde no los haya; rebajar a CIEN pesetas la cuota para tener voz y voto en la Representación Internacional Esperantista, y que éstos y los siguientes acuerdos sean publicados en HISPANA ESPERANTO, para que, por su mediación, lleguen a conocimiento de todos los consocios de H. E. A.

BLACK HAWK

La Grandanima Ruĝhaŭtulo

Black Hawk, nomo signifanta Falko'n Nigra'n, estis sovaĝulo kovranta nur sian nudecon por ne ofendi la moralon, kaj kies kapon ornamis plumoj.

Li komandis gentojn de l'Mississippi-teritorio, li ĉasis sovaĝajn bestojn kaj li defendis sian landon kontraŭ la militekskursoj de la blankuloj. Tiam la usona Registaro, instigate de la plej kruelaj negocantoj, instigis, favoris kaj disvastigis, la eks-termadon de la ruĝhaŭtuloj, pretekstante ke ili ne permesis plugadi la teron. Sed la negocistoj, tamen, ne permesis kulturi la kampojn, kiujn ilia perforto forprenis al la ruĝhaŭtuloj, ĉar ilia intenco kaŝata ne estis fruktodonigi la kampojn sed fari ĉi tiujn bazo por profitdona spekulacio. Tamen, la usona Registaro neniam intencis apliki al la negocistoj saman traton, kian ĝi aplikis al la kompatindaj indiĝenoj; tute male, la Registaro starigadis fervojojn, kiuj grandigis la profitojn komercajn, pli-grandigante tiel kaj tial tiujn de la spekulacio, plialtigante troege la valoron de la terbienoj.

Black Hawk estis nevenkebla. Li fariĝis timinda. Lia milito kontraŭ la Usonanoj estis dudekjara. Fojon, tricent soldatoj bonege armitaj kaj provizitaj ĉirkaŭis lin kaj lian bandon el kvindek samgentanoj nudaj, kaj tamen li venkis terure la soldatojn. Cent fojojn oni venkis lin, kaj cent fojojn renaskiĝis lia bando. Lia rezistado estis vera epopeo.

Venkite de Scott, de Dodge kaj de Atkinson, kaptite perfide de la «wingwags», kaj fine ĉe la manoj de la Usonanoj, li ankoraŭ neis aprobi traktaton por vendi siajn kampojn kvankam aliaj samgentaj estroj liaj, ebriigitaj de l'majoro Harrison, subskribis la vendon. Lia energia, heroa kaj eĉ moralega respondo al la instigoj estis: «La Granda Spirito diris al mi, ke la tero ne estas vendebla: la tero estas nia patrino!»

Lernu kaj spertu per tiu mirinda diro de sovaĝulo pli saĝa ol estas multaj, kiuj fanfaronas pri civilizo per siaj vestoj kaj vanta kulturo.

Julio Mangada Rosenörn

RIBELO DE LA TRUTO

Tiel oni nomas ribelon okazintan en Zamora (Hispanujo) je 1158, pro truto aĉetita de juna filo de ŝuisto, pro kio bando de nobeluloj kaj tiu de popolanoj de la urbo batalis unu kontraŭ la alia.

Intertraktinte kun trutovendisto kaj paginte la truton, la ŝuistido prenis sian truton kaj sin pretigis reveni al sia hejmo, kiam alvenis ĝustatempe al la trutovendejo manĝaĵprovizisto de altranga nobelo, kiu volis aĉeti la truton por la nobelo demandante la prezon:

«—Ĉi tiu junulo aĉetis kaj pagis ĝin jam al mi-diris la trutvendisto.


«—Li ne povas ĝin porti, ĉar mi donos saman pagon, tial ke mi volas ĝin por mia nobelmastro-diris la manĝaĵprovizisto.

«—Neniel vi ĝin portos. Ĝi estas mia, ĉar mi aĉetis kaj pagis ĝin por mia patro kaj regali invitaton, kiu estas ĉe mi-diris la ŝuistido.

«Kaj okazis, ke la nobelservisto kaj la ŝuistido tiel disputadis, ke iuj ĉeestantoj sin montris favoraj ĉu al iu ĉu al alia, partoprenante la aferon tiamaniere, ke okazis kvazaŭ luktado; sed la ŝuistido portis la truton hejmen tial ke ĝi estis lia, kaj li estis paginta ĝian koston...” Tiel rakontas la malnova raporto pri la ribelo, kaj kvankam la okazintaĵo ne estis grava, tamen ĝi estis kaŭzo por batalo inter la du popoloj de la urbo, inter la nobelularo kaj la popolanaro.

Nobeluloj kaj plebejoj, defendante respektive nobelserviston kaj ŝuistidon, sin pretigis por batali. Kaj la plebejoj rimarkinte, ke la nobeluloj kunvenis por interkonsiliĝi, pri la puno donota al precizaj el la plebejoj jam malliberigitaj, ĉe la preĝejo Sankta Mario, aliris amase al la preĝejo, ĉirkaŭiris kaj bruligis ĝin. Inter la kunvenantoj estis du filoj de la grafo *Ponce de Cabrera*, kies servisto, pro malĝentileco estis kulpa je la ribelo.

La fajro detruis vivojn kaj arton; la fajro nenion respektis verŝajne, sed tamen la fajro ne povis detrui nedetruiblaĵon. Ho, mirindaĵo! La flamoj estis nepovaj kontraŭ la Sanktan Hostion, kaj jen kiel klarigas la mirindaĵon, la miraklon, la malnova raporto:



Asturias. — Knabinoj tipe vestitaj.

«Meze de tiel granda brulado, la Sankta Hostio, Korpo de la Savinto, eliris el la hostiujo kaj de la altaro, tra la fumo kaj la flamoj, vidate de multaj personoj, flugis eniri en kavaĵeton de la preĝejo, de kie ellasiĝas tre bonaodoro.»

Pri tio ĉi lasta estas diversaj raportoj. Laŭ la plej nombraj, la Sanktan Hostion oni trovis mirakle ĉe la Sankta Hostiŝranketo de proksima preĝejeto de rifuĝejo, kiu poste fariĝis monaĥinejo, kaj en kiu vivis la edzinoj kaj filinoj de la nobeluloj dum ĉi tiuj militadis. Ankoraŭ oni konservas la Hostion kiel trezoron.

Sed ni daŭrigu la raporton de la ribelo laŭ la malnovaj dokumentoj:

Jus sukcesinte la plano de la plebejoj, kiujn gvidis *Benito el Pellitero*, ili konsciis la gravecon de la ribelo; kaj timante la nobelulojn kaj pli ankoraŭ la grafon *Ponce de Cabrera*, kiu tiam estis urbestro kaj perdis siajn du filojn pro la brulado, kaj kiu ankaŭ estis intima amiko kaj favorato de la Reĝo, amase la plebejoj forlasis Zamora'n elmigrante al Portugalujo.

La puno dezirata de la furiozaj nobeluloj ne okazis, ĉar la Reĝo de Leonlando Ferdinando II^a, konsciante ne povi ripari la faritaĵon kaj la gravecon de la elmigrado pro perdo de brakoj, kiuj povus fariĝi lancoj sub komando de la Reĝo de Portugalujo kontraŭ li, donis al la elmigrantoj la pardonon, kiun ili petis al la Reĝo jam vojaĝante al Portugalujo.

La grafo, kvankam komence ofendite de la pardono, konformiĝis fine forlasante la estrecon de Zamora por okupi altan postenon ĉe la kortego.

Ankoraŭ oni povas vidi la kavaĵeton, en kiun flugis la Sankta Hostio laŭ la tradicio, kaj fera kadro protektas ĝin, ĉe la ofte rekonstruita preĝejo Sankta Mario en la flanko de la Evangelio.

Oni povas opinii pri la miraklo kiel oni volas, laŭ internaj konvinkigoj; sed oni ne povas dubi pri la alta senco morala de la ribelo en tiu malproksima dato, ĉar la okazintaĵo estas unu el multe nombregaj okazintaĵoj en Hispanujo kaj atestantaj kiel la Hispanoj, de plej antikvaj datoj, sciis defendi siajn rajtojn kontraŭ perforto de altranguloj.

J. M. R.

NEKROLOGIO

La 18^{an} de majo mortis en Tocina S-ro Antonio Carrasco nova sed entuziasma esperantisto. Ni esprimas al lia familio kaj al la samideanoj de Tocina la plej koran kondolemon.

ENLANDA KRONIKO

En Oviedo, Orense, Tocina, Zaragoza, k. t. p., okazas ekzamenoj pro la fino de la kursoj kaj ĉi tiuj rekomenciĝas ĉie, kvazaŭ seninterrompa kurslaboro.

En multaj lokoj la gazetaro parolas pri Esperanto tute favore, informas pri la lingvo kaj tial favoras la aferon; speciale «Nuevo Dia», en Caceres, aperigas gravajn artikolojn pri Esperanto, verkitajn de nia tre klera samideano S-ro Fernando Soler, pro kio nia movado naskiĝas ĉe nova loko de kiu elradios kaj disvastiĝos.

En Zaragozo ĵus holandano S-ro Smitt faris impresan paroladon, kies resumon faris la Urbestro, kaj estis granda sukceso. Tiu ĉi fremda samideano vojaĝadas tra Hispanujo, farante propagadon, kaj jam li parolis sukcese en kelkaj lokoj de Katalanujo.

Ĵus oni fondis gravan esperanto-grupon kun la nomo «Zaragoza Esperantista», kies komitato estas la jena: Prez., S-ro Jose Carnicer; Kasisto, S-ro Jacinto Jimeno; Sekr., S-ro Luis Campos; Voĉd., S-roj Juan Rodriguez, Leon Aguaviva, Vicente Ramirez kaj Luis Barrao. Ĉe la hejmo de la sekretario, ĉi tiu klarigas du kursojn, unu po sekso. Ĉi tiu nova grupo varme agas, kaj efike kunlaborados por la disvastigo de Esperanto.

En «La Voz del Correo», «Heraldo de la Posta» kaj «El Magisterio», de Zaragoza, S-ro Oros nelacigeble propagandas kun aliaj fervoroj samideanoj, kaj S-ro Oros malfermis kurson per korespondado por Geinstruistoj. En tute, Zaragoza pli kaj pli vigliĝas al nia afero.

Asturias vidiĝas vigla, agema, entuziasmega: Oviedo nelacigeble agadas per ekskursoj, kursoj, propagandiloj, korespondadoj, ĉiel, ĉiel, por sukcesigi, la VIII^{an} N. K., kaj oviedanojn helpas laboro de Gijón, Noreña, Aviles k. t. p.

En Madrid la samideanoj senĉese agadas, ekskursas portante la semon al najbaraj urboj, okazigas festojn; iuj vigle agadas sukcese por fortigi la Nacian Ligon de Fervojoficistoj; aliaj por havigi rimedojn al nia VIII^a en Oviedo kaj sufiĉe sukcese por vekti atenton al Esperanto kaj al ĉi tiu havigi protekton de la flanko registara, kaj certe per la venonta numero ĉiuj scios gravan novaĵon almenaŭ.

Aliĝu al nia VIII^a Nacia Kongreso kiel eble plej baldaŭ! La Internacia Centra Komitato de Esperanto gratulis nin pro la propagandfolio «Que es el Esperanto», kaj petis senpagan nombron da ili laŭ eblo por propagando en Ameriko, konsiderante la folion tre taŭga, kompleta kaj efikiga.

Bonvolu sendi al la Redakcio koncizajn novaĵojn pri nia movado por ĉi tiu kroniko.

AL LA TUTMONDA INSTRUISTARO ESPERANTISTA!

Preskaŭ ĉiutage oni urĝe petas, aŭ eĉ energie postulas de mi materialon statistikan pri la temoj «*Esperanto en lernejoj*» kaj «*Esperanto inter la instruistaro*». Ĉar ne ĉiuj gekolegoj abonis kaj legas nian «Internacian Pedagogian Revuon», mi nun per niaj aliaj esperantistaj gazetoj petas:

1e. Anoncu vin kiel instruistojn esperantistajn sendante vian precizan adreson!


2e. Bonvolu raporti, ĉu en via urbo aŭ vilaĝo (ne nur vi persone) iam ajn instruis aŭ hodiaŭ instruas Esperanton en iu ajn lernejo. Skribu la nomon de la koncerna lernejo!

3e. Bonvolu turni vin, se vi bezonas korespondantojn el la tutmonda kolegaro por vi men aŭ por viaj klasoj (pro internacia korespondado de l'lernantoj) al ni!

Ni ordigos la korespondan aferon sisteme kaj laŭplane. Cetere ni jam kolektis la adresojn de pli ol 4.000 esperantistaj instruistoj el pli ol 50 landoj.

Ricevinte viajn sciigojn, ni kapablos aranĝi kaj doni konfidindan statistikon pri la supre aluditaj temoj, kiu estas *nepre necesa*.

Sendu la materialon al: *fino Martha Moelke, Sommerfeld, Niederlausitz* (Germanujo), kun kiu mi en «Kunlaborado» kun IALA, New York, kaj la Instituto J. J. Rousseau, Genève, zorgos pri la statistiko. — *D-ro Dietterle*.



Asturias.—Haveneto de Lastres.


HISPANA ESPERANTO-ASOCIO gravege progresas kaj plenumas la rolon por la disvastigo de Esperanto en la tuta lando; tial estas devo de Esperantisto aliĝi al ĝi kaj varbi por ĝi novajn adeptojn. La kotizo estas DU pesetoj (unua kotizo 2,50 pro la membrokartoj). Sendu la kotizon al la sekretario, S-ro Mariano Mojado, strato Abascal, 13, Madrid. Se vi sendus samtempe TRI pliajn pesetojn por subteni la propagandon per ĉi tiu gazeto vi ricevos aukrate kaj ĉiumonate ĝin. LA NOVAJ HELPANTOJ ankaŭ ricevos senpage la novelon «Ferdinando VI^a kaj Farinelli», kaj la unuan kajeron de l'Kihoto; kaj certe ĉiuj konscios ke H. E. A. celas ĉiel kontentigi kiel eble plej bone kaj tute malavare la samideanojn.

Eksterlandanoj, sendintaj KVIN sv. fr., ricevos la gazeton, sen donacoj, ĉar la poŝtelspezo estas tre alta; tamen, se oni sendus SES sv. fr., sendinto ricevus la kolekton 1928. Oni akceptas RESPONDKUPONOJN de U. E. A.

Ĉiu sendu la monon poŝtgire al S-ro Mojado kaj enlandanoj. povas pagi per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

INTERSAŜĜO nur po du specimenoj.

Gazeton, presaĵojn, materialon, k. c., sendu al la Redaĉio.



ATENTU!

Samideanoj, aliĝu kiel eble plej rapide al la VIII Hispana Kongreso en Oviedo! Sendu tuj vian kotizon, varbu el viaj amikoj kaj familianoj kongresanojn, ĉar neniam estos plej bona okazo pro malkareco kaj kompleteco por viziti Asturias'n. La kotizo estas KVIN pesetoj, sendu ĝin ĉu al Oviedo—Ateneo Popular—ĉu al la sekretario de H. E. A., S-ro Mariano Mojado, strato Abascal, 13, Madrid.